

Esperanto

Internacia

Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo

Vol. 3. N-ro 2

Februaro 1939

Vivo de Zamenhof

Edmond PRIVAT



2a eldono. — 134 paĝoj kaj 12 ilustraĵoj.

Broŝ. 2 ŝ. 6 p., bind. 3 ŝ. 6 p., aŝranko 4 p.



« Granda nombro da bildoj sur kreta papero, Fama verko de fama aŭtoro. Stilo ne atingita ĝis nun de alia verkisto : lego de iu ajn paĝo alportas plej altan ĝuon al ĉiu lingvoscianto. Resume : Fiero de nia literaturo. La libron bele ekipitan devus havi ĉiu Esperantisto, kion ebligas la relative tre malalta prezo. »

Ligilo (Ĉeĥoslovakujo).



Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY Ltd., ANGLUJO

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo,

—:— —:— aŭ via kutima esperantista librovendisto. —:— —:—

ONI ANONCAS

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 0.60 ned. guldено, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 0.30 guldено. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝ giro 1306.30**

(s-Gravenhage). Familiaj anoncoj senpage.

Naskiĝo. Ges-roj Joh. M. Duinker kaj E. Duinker-Keijser, Parkstraat 5, Den Burg (Texel), Nederlando, informis nin pri la naskiĝo de filino, nomita Willy Johanna. — Nian koran gratulon!

Gefianĉiĝo Goddard-Bailey. Esperanto unuigas: Gefianĉiĝis f-ino Mary Goddard, kaj s-ro Louis Bailey, ambaŭ fervoraj membroj de la Esperantogrupo « Ciam antaŭen » en Leicester, Anglujo. Ni kore gratulas!

Geedziĝo Tuinder-Langereis. Geedziĝis s-ro H. J. Tuinder, del. de IEL en Serbelawan, Nederlanda Hindio, kaj f-ino Anneke Langereis, Pem. Siantar, Ned. Hindio. — Niajn korajn bondezirojn!

Geedziĝo Brunskog-Jansson. Karlhugo Brunskog edzinigis Susanne Jansson, en Lidingö, Svedujo, la 24-an de decembro 1938. — Nian plej koran gratulon!

Geedziĝo Turner-Blomquist. La 26.12.1938 okazis en Nya Varvet, Svedujo, la geedziĝo de Fred. H. Turner, antaŭa IEL-delegito en Rochester, Anglujo, kun Stina Blomquist, sekr. de la klubo « La Ondo » en Nya Varvet. La novgeedzoj loĝos en Linköping, Svedujo. — Ni gratulas plej kore.

Distingo. Nia konata franca pioniro, la prezidanto de SFPE, s-ro Ernest Archdéacon, en Saint-Cloud, Francujo estas ordenita per la rozeto de Oficiro de la Honora Legio, pro siaj meritoj pri aviado kaj pri Esperanto. — Plej koran gratulon!

Letervespero. La laboresperantoklubo « La Norda Stelo » okazigos letervesperon la 9-an de februaro. Sendu leterojn! Certa respondo. — Leo Nielsen, Kjellerupgade 2, III., Aalborg, Danujo.

Poŝtkartvespero. La Esperanto-Klubo en Motala, Svedujo, aranĝos la 10-an de februaro 1939 poŝtkartvesperon, kaj samtempe festos sian dek-jaran ekzistadon. Sendu kartojn al la jubileo! Certa respondo. Adresu per ĝardenisto Carl Hallros, IEL-delegito, Bispmotala Handelsträdgård, Motala, Svedujo.

Letervespero. Amika grupo de 40 ge-Zamenhofanoj, kune kun kursfinintoj, aranĝas letervesperon la 25-an de februaro. Skribu amase! Almenaŭ unufojan respondon solene garantias: S-ro A. Sanik, Królewska 13, Lublin, Polujo.

Letervesperon okazigos la 27-an de februaro la kursanaro en Moia. Taŭga okazo bone propagandi Esperanton kaj atingi terovorajn geesperantistojn kiel korespondantojn (preskaŭ ĉiuj estas membroj-abonantoj de IEL). Skribu el la tuta mondo kaj sendu Esperantaĵojn al la kursestro R. Molera, Catalunya 13, Moia (Barcelona), Hispanujo.

Al la geinstruistoj! — S. Kubo, japana samideano, studanta belart-edukon inter infanoj, petas helpon de geinstruistoj de ĉiuj landoj, por interŝanĝi infanajn desegnaĵojn de elementa kaj mezgrada lernejoj kun japanaj. Geinstruistoj interesitaj bonvole skribu al (ĝis februaro): S. Kubo, Maison du Japon, Cité Universitaire, Paris 14, Francujo, — donante la nombron da desegnaĵoj dezirataj kaj proksimuman aĝon de infanoj. Post ricevo de japanaj desegnaĵoj, sendu al supreskribita adreso. (Post la 10-a de marto, al: S. Kubo 18, Sadohara 3-tyome, Usigome, Tokyo, Japanujo. (565))

Kongresa biciklado. Kiu interesiĝas pri bicikla ekurso antaŭ, dum, aŭ post la Berna aŭ Kopenhaga kongreso, bonvolu skribi, senprokraste, al: John Conroy, 21, Devonshire Drive, Mickleover, Derby, Anglujo. — Li penas aranĝi tian bicikladon.

La B'iblio estas la libro plej legata, plej disvastigita. Por ricevi, senpage, parton el ĝi, skribu al: La Domo de la Biblio, Dept. A.B.I., Genève, Svislando. (566)

Konatiĝu kun abstineca movado! Volonte sendas sian 52-paĝan verkon pri tiu ĉi aktuala internacia demando je 2 internaciaj respond-kuponoj staciestro H. Salokannel, Uusikaupunki, Finnlando.